

BELGA ESPERANTO-FEDERACIO



58a jaro n° 3  
majo - junio 1966


# Sonorilo

oficiala dumonata bulteno de B.E.F.

**REDAKCIO :** JAUMOTTE MAURICE  
ROOSE FERNAND, SINT-KIARADREEF 59, BRUGGE TEL. (050) 319.81  
MAERTENS GRÉGOIRE  
POUPEYE CHARLES

**KUNLABORANTOJ AL REGULAJ RUBRIKOJ :**  
DR. POL DENOËL      DURWAEL IVO      ISERENANT ROGER

**ADMINISTRADO :** TERRYN J. RAAPSTRAAT, 72 GENT



**ASOCIO SEN PROFITA CELO**

**SIDEJO & PREZIDANTEJO**

DEBKUYNLAAN 44, WILRIJK TEL. (03) 377758

**HONORA PREZIDANTO**  
KEMPENEERS PAUL

**HONORA VICPREZIDANTO**  
SIELENS HENRI

**ĜENERALA PREZIDANTO**  
JAUMOTTE MAURICE

**HONORA VICPREZIDANTINO**  
PLYSON J.

**PREZIDANTOJ**  
DEBROUWERE GERARD, MAGDALENASTRAAT 29 KORTRIJK  
DR. DENOËL POL, 20 RUE V. RASKIN LIÈGE

**UNUA VICPREZIDANTO**  
ROOSE FERNAND

**VICPREZIDANTO ĜAKESTRO PRI TEKNIKAJ RIMEDOJ**  
VERSTRAËTEN JULES, SINT BERNARDSE STEENWEG 1078 HOBOKEN

**ĜENERALA SEKRETARIO**  
DE ROOVER R., LUCHEVAANTSTRAAT 28 BORGERHOUD

**SEKRETARIO POR LA NEDERLANDINGVA REGIONO**  
MAERTENS GRÉGOIRE, PRINS LEOPOLDSTR 51, ST-KRUIS TEL. (050) 34935

**SEKRETARIO POR LA FRANCLINGVA REGIONO**  
DE CUYPER GEORGES, 66, RUE DE DORLODOT, MONCEAU SUR SAMBRE

**KASISTINO** TERRYN JULIETTE, RAAPSTRAAT 72, GENT

**POŝTKONTO DE B.E.F. :** 1634.34 RAAPSTRAAT, 72, GENT


**ĈEFDELEGITO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO**  
FR. SCHELLEKENS, FRANS HENSSTRAAT, 44, ANTWERPEN 2  
P.K. 9051.25

## mallonga historia skizo pri LOVENO

Unua mencio pri Loveno datumas el 884. Tiam ekzistis aglomeraĵo ĉirkaŭ fortikaĵo, en la suda parto de la urbo, kie en 891 la Ĝermana reĝo Arnulfo de Karintio venkis la Nordmanningojn. Ĉirkaŭ la jaro 1.000 grafo Lamberto kun la Barbo forlasis ĝin kaj loĝis en nova « kastro » (= fortikaĵo) sur insulo en la rivero Dilo, proksime de la Sankta Petro-preĝejo. Ĉirkaŭ tiuj lokoj oni konstruis en la dua duono de la 12-a jc. la unuan remparon. Je 1250 la grafo refoje forlasis tiun kernon por ekloĝi en tria sinsekva fortikaĵo sur la « Keizersberg » (= Cezara monto). Loveno kuŝis ne nur flanke de la Dilo, sed ankaŭ sur la grava trafikvojo de Brugge al Kolonjo. En la sama jc. la teksindustrio estis floranta. Depost la komenciĝo de la 14-a jc. ankaŭ en Loveno komenciĝis la sangaj bataloj inter « burĝoj » kaj laboristoj kiuj postulis saman rajton kiel la burĝoj, nome partoprenon en la urbestrado. Konata « patricia » gvidanto de la laboristoj estis Petro Coutereel. Ili venkis. Sed tiuj interbataladoj kaj konkurenco de Anglujo ruinigis la ekonomion de la urbo. Por al ĝi doni novan vivon, oni klopodis akiri de la Papo la rajton starigi universitaton. Tio sukcesis en 1425. Kelkajn jarojn poste Matheo de Layens metis la unuan ŝtonon de la belega Gotika urbodomo, vera juvelo. En la sekvintaj cent jaroj oni konstruis multajn pliajn universitatajn kolegiojn (ekz. de la St. Spirito, 1445 ; de St. Ivo, 1488 ktp.)

La dua duono de la 16-a jc. kaj la tuta 17-a jc. estis por ĉiuj niaj teritorioj (esc. la Princ-Episkopejo Lieĝo) terura tempo ; konstantaj militoj religiaj kaj aliaj. La Lovena loĝantaro kiu estis en la 15-a jc. kreskinta ĝis 25 mil, estis ankoraŭ nur 7 mil en 1578. Ekonomian progreson ĝi ree konis sub imperiestrino Maria Theresia de Aŭstrujo.

Sed novaj malfacilaĵoj ekestis kiam imperiestro Jozefo II-a metis la universitaton sub ŝtata kontrolo. Sed sub la okupado de la Francoj (1794-1815) la universitato estis forstrekita. La Holanda reĝo Vilhelmo restarigis ĝin, sed kiel ŝtatan universitaton ! Kiel tia ĝi daŭrigis la ekzistadon ĝis 1834. Tiam ĝi estis nuligata kaj la Katolika, kiu intertempe estis jam starigita en Meĥleno, transiris ree al Loveno. En la lastaj cent jaroj instaligis multaj industrioj (precipe nutraj) en tiu urbo. Ankaŭ la nombro de studentoj tre grandigis : pli ol du dek mil en urbo de 40 mil loĝ. En la du mondmilitoj la urbo estis terure trafata kaj speciale la universitato kies biblioteko dufoje tute forbruliĝis. Je tiu dua fojo pli ol 900 mil libroj pereis.



48-a KONGRESO DE B.E.F.  
28, 29 & 30.5.1966


Loveno  
pentekosto

ADRESO POR KORESPONDADO  
S-ino Meurrens, Naamsestraat, 78, Loveno.

HONORA KOMITATO (Aldono)

Urbestro Sinjoro Smets A.

La vojo al la akceptejo



Plej facila vojo por ĝin atingi : Kiam vi alvenos de la Stacioplaco per aŭtobusoj 1-2-3-4 aŭ 6 (5 fr.) kiuj haltas sur la Granda Placo inter Urbodomo kaj S. Petropreĝejo, vi eniru dekstre de la urbodomo, la Naamse straton. Laŭiru ĝin maldekstre ĝis la dua strato (Lakenwevers) kiu kondukas vin rekte al nia akceptejo se vi venas piede. Se vi venas aŭtomobile vi enveturu la trian straton (Standonck) aŭ la kvaran (S. Michiel).

Ce la stacidomo bonvenigos vin Samideanoj de la 14-a ĝis la 15 1/2 h. kaj donos informojn pri hoteloj kaj aŭtobusoj irantaj AL LA CENTRO Aŭtomobilveturantoj atentu niajn vojmontrilojn kun verda stelo kaj « ESPERANTO ».

## PROGRAMO

Sabato 28.5.1966

- 14-a horo : malfermo de la akceptejo kaj de la kongresgicetoj.  
16-a horo : kunsido de la administrantaro de BEF  
17-a horo : vizito al Muzeo Vanderkelen sub gvidado de S-ro Paul Maes (konservatoro de la Publikaj Asistancoj).  
La muzeo situas en la Savoyestrato, 6.  
19.30-a horo : oficiala malfermo : enkonduka parolado de la LKK-Prezidanto, D-ro Piot ; salutoj de la oficialaj reprezentantoj kaj de la grupoj de BEF. Festparolado de S-ro M. Jau-motte, ĝenerala Prezidanto ; poste distra vespero.

Dimanĉo 29.5.1966

- 9-a horo : malfermo de la gicetoj.  
10-a horo : kunsido de BEF - poste akcepto en la urbodomo.  
La akcepto en la urbodomo okazos je la 11.30 h.  
12.30-a horo : fotografado.  
15-a horo : promenado al la granda Beginejo ;  
17-a horo : Sankta Meso en St Miĥaelo kun prediko de Kan. Gillet ; la preĝaro en esperanto por la celebronto kaj por la asistontoj farita de Frato Arni.  
19.30-a horo : Bankedo - Balo - Tombolo.

Lundo 30.5.1966

- 9-a horo : Ekskurso per aŭtoĉaro : Muzeo de Tervuren (vizito al la Kongo-Muzeo kun gvidisto), restado ĉe Zoete Waters.  
13-a horo : Vizito al la abatejo de Park - Heverlee (Norbertanoj) ; Manĝeto en Wilsele.  
17-a horo : Realveno en Loveno.

— 126 GEPARTPRENONTAJ JAM NUN —

### AVIADILE AL TEL-AVIV 1967

En kunlaboro kun UEA ni organizos la aviadilan vojaĝon al Israelo, de el Bruselo, por 20 tagoj (30.7.67 - 20.8.1967). La ĉi-subaj prezoj provizore enkluzivas nur la aviadilon por iri kaj reveni, kaj 10- tagan restadon en Tel-Aviv kun matenmanĝo kaj servmono, kaj estas bazitaj je dultitaj ĉambroj :

Luksa	19.300 fr.	Turistklaso	17.000 fr.
Unuaklasa	18.400 fr.	Tria	14.750 fr.

Por la lastaj dek tagoj, provizore do ne enkalkulitaj en la prezoj, belaj ekskursoj tra la lando estas planataj pri kiuj ni baldaŭ publikigos pliajn informojn.

Maertens G.

# E. L. M. WENSING

## LA LINGVA

## PROBLEMO

## EN

## INTERNACIAJ

## EKONOMIAJ

## RILATOJ

(daŭrigo)

Kaj tio estas tute ne miriga afero, ĉar nur alte intelektaj mensoj, dotitaj de granda lingvistika talento, scipovas akiri fluan parolkapablecon kaj sintakse pure korektan stilon en pluraj fremdaj lingvoj. Ili estas kaj ĉiam restos grandaj esceptoj. La grandega plimulto atingas post longjara praktika uzado kaj sindona studo, iom akcepteblan nivelon kaj sukcesas skribi ne tro komplikan leteron en tri aŭ kvar fremdaj lingvoj.

La internacia komerco kaj ekonomio floras kaj prosperas kiel neniam antaŭe. Komercestoj, industriistoj, ekonomoj prave konsideras la tutan teron kiel sian laborkampon. Sur ĉiuj kampoj, komerco kaj industrio progresis multege. Tiu evoluo daŭros, fakte ĝi estas nehaltigebla. En imitinda spirito komerco, ekonomio kaj scienco kunlaboras, kunligas ĉiajn fortojn por plialtigi la gradon de efikeco en produktado de varoj kaj en rapida distribuo tra la mon-

do. Ĉio fariĝis pli rapida, pli efika, pli ekonomia. Nur unu problemo restis! Hodiaŭ ĝi estas ankoraŭ same malfacila, same multekosta, same senesperiga kiel antaŭ jardekoj. La problemo de la diverslingveco.

Kion faras la internacia komerco, kiu tiel emas raciigi ĉion? Ĝajne en plena rezignacio, ĝi klinas la kapon antaŭ la neeviteblo, akceptante la faktojn. Regas ankoraŭ la ĝenerala opinio en multaj ekonomiaj medioj, ke la angla lingvo alportis la solvon de la lingva problemo. Sed kiom da francoj kaj italoj scipovas korekte paroli la anglan lingvon? Proprasparte mi konstatis dum longjara vojaĝado tra la tuta mondo, ke en multaj eŭropaj landoj la angla lingvo ne estas ĝenerale parolata, eĉ ne komprenata. Ĉu eble la franca lingvo estas sufiĉe konata en la romandaj landoj, kiel ekz. Italujo, Hispanujo, ktp.? Absolute ne. Sed oni lasas sin tre facile misgvidi per la kelkaj frazoj kaj esprimoj en angla, franca aŭ germana lingvoj, kiujn elsprucas hotelpordistoj aŭ bankoficistoj aŭ taksi-ŝoforoj. La internacia komerco kaj ekonomio tamen ne povas kontentigi sin per kelkaj fak-frazoj aŭ kliŝ-esprimoj. Oni bezonas normalan, logikan, fluan kaj esprimriĉan lingvon, per kiu oni kapablas klare formuli siajn pensojn kaj ideojn, per kiu oni povas konvinki aliajn, per kiu oni povas argumenti kaj persvadi.

Ni, Esperantistoj, ne volas laŭte kaj brue heroldi kaj trumpeti, ke

tia lingvo ekzistas, ke oni kaptu tiun unikan lingvon ambaŭmane, ĉar Esperanto ĉiutage milfoje pravas sian taŭgeblecon, sian plenan valoron. Kaj ĝi ne estas la lingvo de nuraj intelektuloj, de lingve dotitaj kapoj. Ne, ĝi estas perfekta lingva instrumento de ĉiuj; kaj ĉiuj tavoloj de la socio ĝin kapablas lerni kaj apliki en praktiko. Ni, Esperantistoj, ni ja perfekte scias kiel riĉega estas nia lingvo en nuancoj, en eblecoj, kia senlima estas ĝia esprimkapablo. Ĝi estas lingvo, kiu kombinas strukturan simplecon kaj melodian belsonon kun grandegaj meritoj, sociaj kaj kulturaj.

Je la fino de kunveno, kiun organizis antaŭ kelkaj jaroj la Eŭropa Fondaĵo de Kulturo en Tuluzo, aro da delegitoj kunsidis por fari siajn raportojn. La plimulto el ili senerare metis la fingron sur problemon, kiu en la larĝiganta kunligo de la moderna mondo, fariĝas ĉiutage pli urĝa kaj pli grava.

Unu el la Britaj delegitoj koncize resumis ĝin jene: « Unu el la plej grandaj baroj, malhelpanta interkomprenon en iu ajn internacia kunveno estas, memkompreneble, la lingvo. Ĉu la Fondaĵo povas proponi programon por stimuli pli vastan kaj pli efikan sistemon por la lingvo-instruado? »

La diverslingveco estas problemo, kiu en ĉiuj formoj, sentigas sin, ne nur en Eŭropo, sed ĉie en la mondo. La politika kaj ekonomia modelo de la multnacia kreaĵo de la Eŭropa Komuna Merkato estas paŝon post paŝo ellaborata pere de diplomaciaj kanaloj. Sed, se ekzistas unu minaco kiu kapablas bremsi ĝian progreson kaj subfosi ĝian harmonian disvolviĝon, ĝi estas la problemo de la

diverslingveco. Ĝi estas problemo, kiu en relative mallonga tempo, alprenis treege urĝan aspekton kaj ĝi estas faceto de unu mondo, kiu dank'al la internacieco de la nuntempaj leĝoj ekonomiaj, fariĝis en la daŭro de unu generacio, kvazaŭ la unuiginta globo, pri kiu revis la antikvaj filozofoj.

Ĉu la internacia komerco servas sin de Esperanto? Verdire, ankoraŭ ne! Estas iuj firmoj kaj entreprenoj, kiuj uzas la lingvon malgrandskale por eksterlanda korespondo aŭ kiuj gluas esperantlingvajn etiketojn sur siajn varojn, sed tiun uzadon oni apenaŭ povas nomi praktika utiligo de Esperanto.

Kiel ekspliki, ke nia lingvo, tiom da fojoj elprovita en praktika uzo, en internaciaj kongresoj, en scienco kaj literaturo, ĝis nun ne trovis pli gravan aplikon en tiuj medioj, kiuj pleje bezonas ĝin? Sinjoro


LES ENTREPRISES

**DERKS**

226, Rogierstrato, BRUSELO 3

Tel. : 16.89.92 Entrepreno de

KONSTRUAJOJ



## Unua konferenco de franclingvaj bef-anoj en Namur

Sub la prezidanteco de D-ro P. DENOEL, asistata de F-ino A. ORSOLINI, kunvenis en Namur la dimanĉon, 20-an de marto, 30 franclingvaj BEF-anoj, kun la intenco pristudi kelkajn problemojn komunajn al la franclingvaj grupoj.

### DECIDOJ

1. Nova franclingva Sekretario estas proponata al BEF, kiel anstataŭanto de S-ano G. de CUYPER, eksiginta pro troa profesia kaj aliasocia okupoj. Unuanime estis akceptata la kan didateco de S-ano PAULUS, iama prezidanto de la Karlareĝa Grupo.
2. Teksto de telegramo al la jusa nova ministro de belga registaro, s-ro Jan PIERS, kiu kiel urbestro de Ostendo tiel amikece akceptis la kongresanaron en 1965: « Groupes wallons de Fédération belge pour Esperanto saluent et félicitent nouveau ministre Jan Piers » (Valonaj Grupoj de Belga Federacio por Esperanto salutas kaj gratulas novan ministron Jan Piers).
3. Jena Rezolucio estis unuanime aprobata :  
« La unua Konferenco de franclingvaj Grupoj de B.E.F., kunveninta en Namur, la 20-an de marto 1966, sendas koran saluton al la Ĝenerala Prezidanto Maurice JAUMOTTE kaj al la Estraro de BEF; esprimas sian fratecan senton al la nederlandlingvaj Grupoj; decidis komune labori sur propaganda tereno, por plifortigi la jam ekzistantajn grupojn kaj akceli la kreadon de novaj. »

Por la Konferenco: A. ORSOLINI - D-ro P. DENOEL.

## FIRMA VAN ISEGHEM & VERSTRAETEN

P. V. B. A.

St.-Bernardse steenweg 631  
Hoboken

Vitraloj - Speguloj -  
„securit“ vitro  
kolorigitaj vitroj  
aluminiaj senmastikaj  
stangoj por kupoloj

Vitro-cementoj por  
tutvitra-konstruaĵoj  
mastiko  
telefono 37.88.20

### KORESPONDANONCOJ :

S-ro Jan GOLDRICH  
ul. 29, augusta 22/7  
HANLOVA (Ĉeĥoslovakio)

S-ro Graham HARRIS  
Sledbrook House  
Crowdage - Stocksbridge  
SHEFFIELD (Anglujo)

S-ro Apostol NEDKOV  
strato « Sofroni Vrachanski », 2  
SLIVEN (Bulgario)

deziras korespondi, kun gesamideanoj en Belgio kaj celas seriozan poŝtmarkinterŝanĝadon

deziras interŝanĝi Anglajn kaj Novzelandajn poŝtmarkojn kontraŭ Belgaj P.M. (filatelisto komencanto)

deziras interŝanĝi ne uzitajn P.M. en plenaj serioj kun gesamideanoj en Belgio.

Vogelmann, en sia libreto « Esperanto en Komerco » diras i.a. ke la ĝisnuna periodo de Esperanto estis pli-malpli ĝia idealista periodo. Idealista ĝi estis, malgraŭ la fakto, ke kelkfoje la lingvo servis al praktikaj celoj. Tamen, li diras, ĝis nun dominis en nia movado kaj inter niaj samideanoj la idealismo. Pioniroj, idealistoj kaj tiuj kiuj interesiĝas pri la lingvistika flanko de Esperanto vizitas niajn kongresojn. Idealistoj flegas la internaciajn rilatojn. Idealistoj verkas kaj eldonas librojn kaj gazetojn, donas kursojn kaj dediĉas sian tempon kaj laboron al la plidivastigo de Esperanto. Estas certe, ke multaj kursanoj atendas praktikan utilon aŭ helpon, vizitante fremdajn landojn, sed baldaŭ ili ekkonas la veran situacion kaj oftfoje forlasas la movadon seniluziigite.

Se ni vere volas solvi la lingvan problemon en internaciaj rilatoj per la enkonduko sur vasta skalo de Esperanto, ni ĉiuj akcentu kaj emfazu la praktikan valoron kiun povus alporti al la homaro la ĝenerala enkonduko kaj agnosko de la Lingvo Internacia en interpopolaj rilatoj. Tiel longe kiel Esperanto ne donas tujan, veran, praktikan utilon al la homoj kiuj pristudis ĝin, ĝi ne estos tutmonde akceptata kaj nia varbado ĉiam restos pena afero. La amasoj ne lernos ĝin, la komerco ne enkondukos ĝin, la scienco ignoros ĝin. Sed kiam la mondo ekvidos ke tiu lingvo-instrumento kapablas alporti rapide grandajn materiajn kaj aliajn avantaĝojn, la divastigo de Esperanto tra la tuta mondo iros aŭtomate, senpene, per si mem. La Esperanto-movado havas la devon urĝe krei tiujn eblecojn, kiuj havi-

gas tujan, kapteblan, klare videblan avantaĝon. Eble pluraj samideanoj konsideros tiujn eldirojn materialistaj, malaltnivelaj aŭ eĉ kontraŭ la ideoj kaj konceptoj de Zamenhof mem. Mi demandas al vi ĉu la grandaj esploristoj kaj inventistoj estis materialistoj, nur pro tio, ke ili kreis praktike uzeblajn objektojn, kiel ekz. vapormaŝinon, fervojojn, telefonon, aŭtomobilojn kaj aviadilojn? Tute certe ne!

Se hodiaŭ pluraj entreprenoj kaj komercaj firmoj eldonas broŝurojn kaj katalogojn en Esperanto, faras anoncojn kaj reklamojn en Esp.-revuoj kaj gazetoj, ili ne faras tion ĉar ili atendas grandan praktikan utilon. Ili nur simpatias kun la lingvo kaj helpas prepari la vojon en la estontecon. Sekve estas nia komuna tasko cerbumi kaj elpensi kiamaniere ni povas interesiĝi la komercon kaj industrion pri Esperanto. La estontaj avantaĝoj estas evidentaj.

Laŭ mia opinio, ĉiuj Esp.-organizaĵoj tra la tuta mondo nepre devas ŝanĝi sian propagandon kaj siajn metodojn de varbado, sian tutan aktivecon, atentigante pri la grandegaj praktikaj valoroj kaj mondampleksaj servoj, kiujn la ĝenerala enkonduko de Esperanto kiel potenca interkomprenilo en la internacia vivo de la hodiaŭa mondo povas havigi. Je ĉiuj okazoj oni ne preterpasigu la okazon por emfazi la urĝan neceson de neŭtrala lingvo por celoj de intergenta komunikado.

Kun la celo enkonduki la ĝeneralan uzon de Esperanto en la internacian komercon kaj industrion, estis oficiale fondita fine de 1963 la « Instituto por Esperanto en Komerco kaj Industrio », kiun

ni nomu mallonge « EKI ». Ĝin iniciatis tri personoj, kiuj ĉiuj estas, dum longaj jaroj, aktivaj kaj spertaj sur tiu ĉi speciala tereno. EKI trovis multe da simpatio kaj kunlaboro, sed ĝi ne povas okazigi miraklojn. Estas nepre necese, ke la tutmonda Esperantistaro kunhelpu, propagandu kaj diskonigu ĝiajn celojn. EKI ankaŭ funde esploris, ĉu la Esperanta movado jam estas preta por serioze rekomendi la uzon kaj utiligon de Esperanto al komerco kaj industrio. Oni devis konstati, ke mankas taŭgaj lernolibroj por studi la komercan korespondon, ke mankas vere internacia, poliglota fakterminaro kun klaraj, esperantlingvaj difinoj de la plej frekventaj komercnocioj. Eble multe pli ol sur kiu ajn alia kampo, la komerco kaj industrio bezonas absolutan precizecon, klarajn priskribojn, ekzaktajn terminojn kaj uniformecon de nocioj kaj interpretoj. Tiuj, kiuj iom konas la internacian komercon ja scias, kiom da specoj de kambioj kaj traktoj ekzistas. Eĉ en naciaj lingvoj ne estas ĉiam tute klare kiaj diferencoj ekzistas inter tiu multeco de specoj. Internacia lingvo ne povas lasi ian ajn dubon tiurilate. Pro tio EKI vidis kiel sian unuan kaj plej gravan taskon la kompiladon de moderna, ĝisdata fakterminaro kun Esperanto kiel la gvidlingvo. Estis malfacile trovi vere internacian reton de kapablaj, plene fidindaj fakkunlaborantoj, sed la laboro komenciĝis kaj jam multe progresis. Kiam la fakterminaro por komerco kaj industrio estos havebla, ĝi servu kiel bazo por la verkado de komercaj lernolibroj, modelaj leteroj, por la traduko de internaciaj dokumentoj uzataj en komerco kaj indus-

trio.

Poste sekvos espereble la pretigo de Esperanto kaj ĝia adaptigo al la multegaj specialistaj branĉoj de internacia komerco, kiaj ekz. bankado, asekuro, transporto, internacia ekspedo, merkato-esploro, internacia borsmondo, ktp. ktp. Ĉar ankaŭ ĉiuj tiuj subpartoj de la internacia komerco kaj industrio posedas siajn specialajn terminologiojn kaj fakesprimojn. Estas giganta laboro kaj ekzistas timiga manko de alte kvalifikitaj Esperantistoj-specialistoj por tiuj nombraj kaj komplikaj fakoj. La malmultaj kiuj kapablas valore kontribui estas ĝenerale tiom okupitaj per siaj profesiaj devoj ke ili ne povas plene dediĉi sin al la gravaj taskoj farendaj.

Sed, la klimato por nia lingvo estas favora. Neniam antaŭe, la mondo estis pli internacia ol hodiaŭ, neniam la problemo de la multlingveco altrudiĝis pli akre. Distancoj malaperis. Intergentaj kontaktoj daŭre plifrekventiĝas. La mondo bezonegas internacian, duan lingvon, se ĝi volas plue kultivi kaj flegi la interhomajn rilatojn. Se ni, Esperantistoj, per nia kuraĝo, klarvideblo, entuziasmo kaj konstanta laboro jam ebligis 50 Universalajn Kongresojn, se du teruraj mondmilitoj ne sukcesis mortigi nek nian idealon, nek nian lingvon, se ni klare vidas kiel ekde nun meti la akcentojn kaj emfazojn, se ni kapablas pli racie direkti kaj gvidi nian propagandon, mi estas certa, ke komune ni sukcesos solvi la problemon de la lingva ĥaoso, ne nur en internaciaj ekonomiaj kaj komercaj rilatoj, sed sur ĉiu kampo de la homa socio.

E. L. M. Wensing

## U. K. en BUDAPEST

**Vizo** : Ni refoje atentigas ke ne plu necesas antaŭdeponi fiksitajn sumojn nek speciala invitletero por ricevi la hungaran vizon, sed **sufiĉas montri la kongresan karton**. La diverslandaj hungaraj ambasadoj estas pri tio oficiale informitaj.

**Fervoja rabato** : Per cirkulero no. 106256/1966.1/D de la 16-a de marto 1966 la Ministerio pri Transportoj Hungara informis ĉiujn kompetentajn fervojajn instancojn en Eŭropo ke la partoprenantoj en la 51-a Universala Kongreso rajtas ricevi rabaton de 50 % je la normala prezo por la vojaĝbileto en la hungara teritorio. L.K.K. estas nun atendanta informojn pri sama favoro fare de aliaj ŝtataj fervojoj.

**Aliaj rabatoj** : La partoprenantoj en la 51-a Universala Kongreso havos la eblecon uzi senpage — dum la kongresa periodo — ĉiujn publikajn transportilojn en Budapeŝto (tramoj, aŭtobusoj, subtera fervojo).

**Hoteloj** : Ni informas ke ne plu estas la ebleco rezervi litojn en hotelo de Kategorio D. Ni samtempe atentigas ke mendoj por litoj en hoteloj de kat. A, B kaj C devas atingi la konstantan adreson de la Kongreso antaŭ la 25-a de majo 1966 — vidu informojn pri tio en la Dua Bulteno.

**Statistiko (je 30.IV.1966)** : Alĝ. 1, Arg. 2, Aŭstral. 3, Aŭstr. 42, Belg. 48, Braz. 2, Brit. 124, Bulg. 132, Ĉeĥ. 256, Danl. 52, Finnl. 46, Franc. 272, G.D.R. 206, F.G.R. 142, Grek. 6, Hisp. 12, Hongkongo 1, Hung. 405, Irl. 2, Isr. 7, Ital. 105, Jap. 34, Jug. 47, Kan. 2, Meks. 1, Monako 3, Ned. 126, Norv. 11, Nov-Zel. 4, Poln. 54, Ruman. 16, Sovet. 28, Sved. 118, Svis. 28, Turkujo 1, U.A.R. 1, Urugv. 1, U.S.A. 44.

Entute 2387 el 38 landoj (pasintjare 1430 el 44 landoj).

### Karavano al BUDAPEST

Denove kelkaj aliĝoj : F-ino A. Begodt (Gent - Merelbeke), S-ino van Walsem-Schutte (Almelo - Nederlando), S-ino Dehondt-Hubens (Antverpeno), F-ino Champy (Lieĝo), F-ino Simmons M. (Lieĝo) kaj S-ro Miskimmon W. A. (Hamilton - Skotlando).

Programdetalo : krom la beleagaj urboj kaj urbetoj ni vizitos ankaŭ diversajn naturmirindaĵojn : la glacigrotojn de Dobsina, la salminejon de Salzburg, la Zugspitze, kaj precipe la solan gejseron en Eŭropo, kaj la solan en la mondo kun malvarma akvo : la gejseron de Košice, apud la rusa landlimo.

De la 48 enskribintoj en Belĝujo por la UK, nur 20 aliĝis al la BEF-karavano ! 13 alilandanoj venas de malproksime por ĝui kun ni la internacian atmosferon : kaj sciu ke la vagonaro kaj la ekskursoj en Hungarujo kostas LA DUONAN de nia tuta vojaĝprezo (8.000 fr.), kiu enkluzivas vizon, vojaĝo de 5.000 km, manĝoj, tranoktoj en unua klaso, trinkmono por la ŝoforo, enirprezoj (ekz. folkloro spektaklo en Prago) vizitoj al naturmirindaĵoj (la Zugspitze estas multekosta !) ekskursoj en Hungarujo ! Se vi ne kuniras, vi jetas el la manoj unikan okazon por vizito al Orienteŭropo !

Limdato por la enskriboj : 31 de majo 1966.

Maertens G. Pr. Leopoldstraat 51, Sint-Kruis

## TRILANDA RENKONTIĜO EN SPA

Dimanĉon la 24-an de aprilo okazis en Spa Trilanda Renkontiĝo inter Germanaj, Nederlandaj kaj Belgaj Esperantistoj de la limregionoj. Krome ĉeestis gesamideanoj el pli malproksimaj lokoj: S-ro Galle, prezidanto de « Revelo », el Düsseldorf, unu malnova samideano el Frankfurt, F-ino Orsolini, prezidantino de la Karloreĝa grupo kaj tri samideaninoj el Loveno (i. i. S-ino Meurrens, F-ino Henquinez).

S-ro Joseph Hérion, prezidanto de la Verviers-a grupo kaj organizanto de la renkontiĝo kun familio Demarche, bonvenigis la ĉeestantaron ĉirkaŭ 90-nombran. Okazis poste laborkunsido, sub prezidanteco de S-ro Toussaint Burnelle, la Belga Kontakt-komitato. Post la laborkunsido, la partoprenantoj estis akceptataj en la lukse bela urbdomo, de la urbestro Dr. Jean Barzin, ĉirkaŭata de aliaj urbogvidantoj. Respondis al liaj afablaj vortoj lia iama kolego en la universitato, nia samideano Dr. Pol Denoël, kiu esprimis la esperon ke baldaŭ refloros en Spa la Esperanto-movado. Li donacis lernolibron al la urbestro, kiel al la espereble unua lernonto de la lingvo internacia. Ankaŭ salutis s-roj Paul Firmenich el Aachen kaj H. Peters el Heerlen, kontakt-komitatoj. Fervore ankaŭ ĉeestis nia D. M. Jean Desonay el Spa, esperantisto de 1911, kiu interalie rakontis pri la vizito en Spa de ŝia Reĝina Moŝto FABIOLA, al kiu li estis prezentita kiel Esperanto-praktikanto kaj kiu diris al li: « VI PAROLAS LA LINGVON DE LA PACO! ». Ni notis ankaŭ la ĉeeston de Prof. Vanbreuse kun deko da novaj gimnazianoj-lernantoj kiuj unuafoje kontaktis fremdajn esp. Posttagmeze estis agraba ekskurso tra la urbo kaj la proksima arbaro. Poste, en la kunveno, S-ro Demarche, instruisto, prezentis kaj komentaris belegajn dia-pozitivajn pri Japanujo, faritajn okaze de la 50-a universala kongreso. Antaŭ la adiaŭo kaj la Di-servo (predikanto S-ro pastro Wannemakers, el Maastricht) Dr. P. Denoël prelegis pri kelkaj malpravaj argumentoj kontraŭ Esperanto, rilate la nunajn provojn de la asocio « Esperanto en Lernado » varbi instruistojn.

### Vokas denove... GRESILLON!!

La esperantista kulturdomo en Bauge (Maine et Loire) estas jam bone konata ankaŭ de belgaj esperantistoj. Kiuj iam iris tien, deziregas reiri. Ĝi ja estas ideala ripozo; okazas tre belaj ekskursoj kaj oni estas en esperantista mondo. Kion ĝi prezentas ĉi-jare?

En unua periodo, de la 3a ĝis la 24a de julio oni povos prepari sin je tri ekzamenoj.

La Intern. Turismaj kaj Kulturaj Ferioj okazos de 24 a de julio ĝis 7a de aŭg. Sinjorinoj Chevry, Roux kaj s-ro Babin gvidos ilin. Matene estos prelego; posttagmeze konversacio; vespere distriĝo. Oni restas libera en ĉio tio. Tria periodo, de 7a ĝis 28a de aŭg. kunvenigos ree tiujn kiuj volas lerni en kursoj elementa, progressa aŭ perfektiga.

Demandu tuj kondiĉojn kaj aligu tuj ĉe adreso: Esperantista Kultur-Domo GRESILLON, Bauge (Maine et Loire) France.

## FONDAJO JAUMOTTE-LOQUET

Ricevitaj sumoj post la lasta listo:

F-inoj M. kaj H. Hofkens

1.000 fr.

S-ro E. Paesmans

1.000 fr.

Ĉiuj tri el Antverpeno.

## GRAVA NOTO

En rilato kun la protestoj kiuj aperis en la numero jan.-feb. de « Sonorilo », paĝo du, ni ĝustigas informon kaj sciigas ke Reĝino Elisabeth tre bone konis kaj parolis la Nederlandan lingvon.

La Redakcio.

## NEKROLOGO: S-ino E. van Veenendaal-Bouwes

La 21-an de aprilo, en la aĝo de 68 jaroj, mortis en sia hejmo en Limmen (Nederlandoj) Elisabeth Bouwes, vidvino de S-ro Cornelis J. van Veenendaal. Ŝi estis eksterordinara esperantistino. Ŝi estis pli ol sperantistino. Estas personoj kiujn ni nomas tiel ĉar ili lernis nian lingvon, aŭ eble praktikas ĝin; eble ili eĉ havas ian konvinkon pri la dezirindeco de neŭtrala interlingvo. De alia speco estas tiuj kiuj konfesas la tiel nomatan « Interna Ideo » de E. SED S-ino van Veenendaal-Bouwes akceptis la tuton de la ideoj de Zamenhof, ne nur sur lingva sed ankaŭ sur aliaj terenoj. Tiu tuta idearo iĝis « karno kaj sango » ĉe ŝi. La homajn rilatojn kaj konduton ŝi vidis en la lumo de tiuj ideoj. Tial oni povus ŝin nomi: Zamenhofistino. Senrezerve ŝi metis sin kaj sian havajon je la dispono de tiu idealo. Dum multaj jaroj ŝi estis la spirita gvidanto de la Tutmonda Junular-Organizo. Mi havis la honoron kaj plezuron kunlabori kun ŝi en la redaktado de la revuo « Vivo » kiu celis esti revuo por esperantistaj gvidantoj. Nenombrelajn leterojn ŝi interŝanĝis kun junaj personoj de ĉie en la mondo; kaj la partojn de ĝenerala intereso de tiuj leteroj ŝi publikigis en ofseta revuo, kiu tiel fariĝis riĉa fonto de inspiraj pensoj. Ŝi kapablis penetre priligi personojn, kaj do plej ofte trafis la ĝustajn, oferpretajn kaj kapablajn elementojn. Ŝia hejmo estis ĉiam malfermita por akcepti kaj gastigi ĉiujn esperantistojn. Pro ĉio tio, ŝi estis ne preterpasinta sed restanta esperantisto. Multaj ricevis de ŝi tian konvinkon kiu restas, ĉar ĝi estis fundamentita ne sur la sablo de amatorismo kaj diletantismo, sed sur la roko de la ĝustaj ideoj. Tiuj kiuj ricevis de ŝi parton de ŝia formado al personeco, memoros ŝin ĉiam. Se eble Zamenhof revis ke kelkaj de liaj adeptoj iĝus aliaj zamenhofoj, ŝi vere estis tia: unu de la plej belaj fruktoj de la esperantismo.

F. R.

HET WELGEKENDE  
MAGAZIÏN VOOR MODERNE HERENKLEDING



**in't duifken**

GROTE KEUS  
IN GEREDE KLEDING.

KOSTUMEN - SPORTJASSEN - BROEKEN  
UNIFORMEN - GABARDINEN - LODENS  
STIJLVOL MAATWERK

KOEPOORTSTRAAT 64-66, ANTWERPEN



RABATO POR ESPERANTISTOJ

## ANTVERPENO

### ESPERANTO-GRUPO « LA VERDA STELO »

Kunsidoj : Ĉiuvendrede en « Witte Leeuw » Frankrijklei, 4 je la 20,15a h. Poŝtĉeknumero : 726.54 Deurne.

La 11-an de marto ± 35 geklubanoj ĉeestis pulĉinolan prezentadon de la fama antverpena « Poppenschouwburg Van Campen » kaj poste ankoraŭ agrable babilis en apuda restoracio.

La 18-an S-ro J. Verstraeten paroladis pri « La Mondo en kiu ni vivas » temo kiu permesis al la paroladisto rakonti - foje emociplene, foje amuze - pri propraj travivaĵoj.

La 25-an fama gasto, S-ro G. C. Fighiera, Vic-prezidanto de la brusela grupo kaj iama Konstanta Kongresa Sekretario de la Universalaj Esp. Kongresoj, honorigis la kunvenon per sia parolado pri « Argentino ». Tuta serio da belegaj kolordia-oj pri la argentinaj folkloro, moroj kaj kutimoj (volonte pruntedonitaj de la argentina ambasadejo) kaj propraj fotoj aŭ ilustraĵoj pri la rakontoj de la paroladisto kun la argentinaj samideanoj, pligrandigis ankoraŭ la paroladan allogecon.

La 1-an de aprilo (tamen ne aprilaĵo!) sub prezidanteco de S-ro H. De Roover, S-ro R. Balleux prizorgis la surprizan vesperon al kiu ĉiuvendredano kunportis surprizon. Laŭ tre amuza maniero kaj gaja serĉado la surprizaj premioj estis ŝanĝataj inter la ĉeestantoj, kio kaŭzis novajn amuzajn situaciojn. Cetere S-ro Balleux montris ankoraŭ plurajn aliajn lertaĵojn kaj la Vic-prez. aplaudigis lin pro lia sindonado. S-ro J. Verstraeten konkludis la vesperon per « melodramo » kies fino ankaŭ estis surprizo.

La 8-an de aprilo - pro Sankta Vendredo - oni kunvenis senprograme.

La 15-an S-ro R. Van Eynde bonege flegis la filman vesperon kaj prezentis dokumentajn filmojn inter kiuj 1 estis Esperante parolata (rezulto de kunlaboro inter S-roj Van Eynde, Vermuyten, Montmirail, Haazen (paroladisto) kaj Verstraeten) sub la titolo « Hispanujo, lando de Kasteloj kaj Festoj ». S-ro P. De Smedt, samideano el St.-Gillis-Dendermonde, kiu vizitis la grupon, detale raportis pri la kurso al Kongresoj, kiun li organizis komence de la jaro kaj gvidis ĝis hodiaŭ kaj kies

## GRUPA VIVADO

rezultoj estas pli ol brilaj : 5 lernantoj jam mirinde parolas Esperanton.

La 22-an, oni preparolis diversajn problemojn, i.a. pri la enhavo de la estontaj grupaj programoj. S-ino R. Lecat aldonis legajon pri artikolo kiun ŝi tradukis el la angla.

La 29-an la verdstelanoj denove sidis « Ĉirkaŭ la Fajro » por rakonti. La Prez. M. Jaumotte multe profitis tiun okazon por babili kaj rakonti kaj doni sian vidpunkton pri diversaj eroj de grupa programo kaj al kio diversaj ĉeestantoj aldonis sian ideojn. S-ro H. Vermuyten flegis kelkajn « Lingvajn problemojn » dum S-ro J. Verstraeten organizis malgrandan kvizon pri la diversaj programoj de la 1-a kvaronjaro. Krome li aldonis amuzan legajon.

**Esperanta novaĵo :** Ni ekscias ke en Mortsel (antaŭurbo de Antverpeno) restariĝas Esperanto-grupo. La estraro jam kunvenis sub prezidanteco de S-ro E. Seghers. La kasistino estas S-ino P. Tytgat-De Ketelaere ; la sekretario : S-ro J. Lernout, Heilig Kruisstraat, 11, Mortsel kie oni povas peti ĉiujn informojn. Oni intencas regule kunveni, organizi ekspoziciojn, paroladojn, filmvesperojn k.t.p. Ni deziras al niaj amikoj bonan sukceson kaj plenan ŝancon.

### LIEGO

Dank' al nia bona membro S-ro Guyot, ni solvis la por ni tiklan demandon. Ni havos nun belan kunvenejon. Ĝi troviĝas Rue des Célestines, nr. 14, en la centro de la urbo ; ĉu granda, ĉu malgranda salono laŭ nia deziro kaj antaŭaverto kompreneble, ĉar aliaj ankaŭ ricevas lokon tie. En 1965, post la libertempo, ni kunvenis preskaŭ ĉiusemajne. Ni citu inter la gravaj kunvenoj : 1) publika kunveno honore al la datreveno de la fondo de UNO, en kiu prelegis S-ro Schetter, klerulo, rezerva leŭtenanto-kolonelo, pri nomita UNO ; kaj S-ro Vanbreuse, prof. de la ateneo de Verviers, oficiala delegito de la ministerio pri instruado al kongreso de UEA en Tokio, kiu parolis pri la

## Ensendojn por la julia-aŭgusta numero ni petas antaŭ la 15.6.66

vojaĝo tra Eŭropo kaj Azio.

Tiuj-ĉi prelegoj okazis Franclingve. 2) Zamenhofa festo en decembro kun prelego (Dr. Denoël), diapozitivaj (F-ino Wolff), skeĉo (ges. Dujardin), loterio, ktp.

En 1966 la kunvenoj okazis ĉiusemajne. Ni citu inter la plej gravaj 1) prelego de S-ro Garcet, organizita de la tri grupoj (B.E.F. - Katolika - SAT-Amikaro) ; 2) konkurso pri kantetoj.

La lernantoj de la kurso 1964-65 ne estis multnombraj ; sed ni eltiris novan sekretarion por la grupo : S-ro Donatine.

### BRUGA GRUPO ESPERANTISTA, REGA SOCIETO :

Ek de aprilo la ĉiusemajnaj kunvenoj estis plejparte dediĉataj : dum la unua horo, al la lecionoj de la elementa kurso, regule ĉeestataj de kelkaj fidelaj gelernantoj kaj dum la dua horo, en la kadro de la perfektiga kurso, al lernigaj ludoj. Ni notu tamen, la 12-an de aprilo : paroladon de S-ro. Ch. Pouppey, prez. prepare al la U.E.A. Kongreso en Budapeŝto kaj la 3-an de majo : debaton pri « La plej bela tago de Bruĝo ». Dum la kunveno de la 10-a de majo, nia organo « Sonorilo » estis laŭtelegata kaj komentariata.

### Programo por estontaj kunvenoj :

Dum la libertempaj monatoj julio kaj aŭgusto estas antaŭvidataj kunvenoj en « Strijdershuis » Hallestraat, 14, (Tel. nr. 347.98) la mardojn 5-an kaj 19-an de julio kaj 2-an, 16-an kaj 30-an de aŭgusto, ĉiam je la 20-a horo. La aliajn mardajn vesperojn ni kunvenos, ĉiam je la 20-a, sur la Granda Placo por kuna promenado aŭ terassidado.

Prepare al nova vintra kurso estas planita granda Esp. ekspozicio de la 23-a ĝis la 26-a de septembro.

### BRUGGE « PACO KAJ JUSTECO »

Pere de la Bruĝa gazetaro ni sciigis la publikon ke nia biblioteko disponigas legajon kaj dokumentadon pri la

problemo de la universala lingvo kaj pri esperanto. En la serio de niaj laborkunvenoj ni komencis pritrakti iom specialan aferon, nome la politikajn tendencojn en nia lando antaŭ kaj dum la dua mondmilito. Ĝis nun du vesperojn ni dediĉis al tio. Montriĝas interesiĝo. Tamen ni atendis pli multnombrian ĉeeston. Niaj gemembroj ja scias ke ni povas preparoli tion objektive kaj en serena atmosfero. Kiel sekvon al la parolado pri nuntempa pikturo (cfr. Waringhien) ni havis ankaŭ konferencon kun dia'oj pri nuntempa skulpturo (cfr. la sama!). La prezidanto F. Reese donis tiun konferencon.

En ĉiu kunveno ni laŭtelegas kaj komentarias ĉapitron de la verko de Dr. E. Privat: « Aventuroj de juna pioniro », kiu estas interese (eldono « Stafeto »).

En unu de la sekvontaj kunvenoj ni havos debaton pri la reformado kaj pri la nuna tasko de la instruado. Ni venigos unu aŭ du specialistojn por tiu problemoj kiu interesas nin ĉiujn. Dimanĉon la 22-an de majo ni iras kun la junulargrupo al la Flandra Nacia Kantfesto en Antverpeno. Sporto : de post nun ni ludos la sabaton posttagmeze.

### « Junulargrupo » de « Paco kaj Justeco »

La kurso de la paska libertempo iĝis malsukceso. Nur ses gelernantoj. Montriĝis ke preskaŭ ĉiuj gejunuloj estis for al iu tendaro aŭ alia junula aranĝo. Tre regule la kunvenoj (ankaŭ tiuj de la estraro) daŭrigas. Grupe ni vizitis la majan plezuratan foiron. Kaj grupe ni iros al la Flandra Nacia Kantfesto la 22-an de majo. Ni havas ankoraŭ aliajn planojn pri kiuj ni prefere nun ne ankoraŭ parolu.

### AFRIKA DOMO EN BRUSELO

Nia membro S-ro De Smedt P. donis sukcesan kurson al afrikanoj el Kongo ; pluraj jam parolas flue nian lingvon kaj eĉ ĉeestis nian Lovenan kongreson. Ili fondis grupon kies Prezidanto estas MPOY H., rue de l'Arbre Bnit 89, Bruselo 5.



manufakturaĵo firma DE BROUWERE

Magdalenastraat. 29, Kortrijk (Belgujo) - Tel. (056) 216 54

VIRINAJ BLUZOJ KAJ JUPOJ  
" MAGDELEINE "

deponita kvalitmarko  
la perfekta konfekcio  
fabrikita el plej bonaj svisaj teksaĵoj  
Haveblaj en la bonaj konfekcibutikoj

PRECIPAJ CENTROJ:

Antwerpen	: Aalmoezenierstr. 2
	Abdiĵstr. 57
	Anselmostr. 17
	Nationalestr. 87
Arlon	: Marché-aux-Légumes 16
Brugge	: Breidelstr. 8
Brussel	: Galerie d'Ixelles 9
	Anspachlaan 194
Eupen	: Kirchstr. 14
Gent	: Brabantdam 25
Herstal	: Rue Large Voie 4
Leuven	: Bondgenotenlaan 29
Luxembourg	: Place de la Gare 67
Mechelen	: Grootbrug 8
Roeselare	: Ooststr. 124
Tournai	: Rue Royale 75
Turnhout	: Herentalsstr. 6
Verviers	: Pont St. Laurent 2